

FAKTOJ PRI ESPERANTO

1-ĈEFAJ FAKTOJ PRI ESPERANTO

La kreinto : L. L. Zamenhof (1859-1917) naskita en Bialistok, urbo situanta nuntempe en Pollando. Li poste vivis ĉefe en Varsovio.

1887 : Apero de la Unua Libro « Internacia Lingvo ». Disvastigo tra multaj landoj.

Esperanto en la jaro 2017

- 3 ĝis 5 milionoj da homoj en pli ol 125 landoj lernis Esperanton. Pluraj cent mil homoj uzas Esperanton regule. Por proksimume mil homoj Esperanto estas denaska lingvo.
- 71 Landaj Asocioj
- Multnombraj renkontiĝoj, staĝoj, kongresoj, seminarioj...
- Radiostacioj, (interalie <http://www.muzaiko.info>), televido (<https://esperanto-tv.com/>)
- Muziko, teatro, vasta literaturo originala kaj tradukita...
- Movado, centra oficejo en Rotterdam (NL), Universala Esperanto Asocio (UEA) www.uea.org
- Reto de personoj pretaj akcepti alian esperantiston senpage (Pasporta Servo)
- Fakaj asocioj (> 50) : ĵurnalistoj, juristoj, kuracistoj, poŝtmarkokolektantoj, biciklistoj, instruistoj, vegetaranoj, verkistoj....
- >236 200 artikoloj en EO sur www.eo.wikipedia.org
- En la frazokolekto Tatoeba estas 500'000 Esperanto-frazoj, dua loko post la angla, 600'000.

Por pli da informoj :

www.esperanto.net wikipedia en via lingvo.

Por lerni :

www.lernu.net; www.duolingo.com; www.utalk.com.

2-Genia knabo inventas lingvan sistemon

En 1887 li publikigas novan lingvon de li inventitan. D-ro L.L. Zamenhof (1859-1917) kreis la internacian lingvon Esperanto kaj aperigis ĝin en 1887 sub la nomo 'LINGVO INTERNACIA'. La bazo de la vortprovizo estas internaciaj vortoj cefe el hindeŭropaj lingvoj, grandparte el la latinidaj lingvoj kiel ekz. la franca, kaj el la ĝermanaj lingvoj kiel la angla kaj la germana. Multaj Esperanto-vortoj troviĝas en pluraj lingvoj (ekz. fenestro – germane „Fenster“, france „fenêtre“, itale „finestra“). Multaj esprimoj en Esperanto estas por ni 'ĉiutagaj' fremdvortoj: aboni – de: abonieren, fr: abonner; ekologio – de: Ökologie, fr: écologie; foto – de: Foto, fr: photo; tigro – de: Tiger; fr: tigre; temas pri pli malpli internaciaj vortoj.

1905: Unua universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar (Francio)

1908: Kreo de Universala Esperanto Asocio UEA.

Post 1918: Forta disvastiĝo. Apero de multaj libroj.

1933 kaj poste: Diktaturoj provas detru la lingvon kaj ĝiajn uzantojn.

1954: Unua Rezolucio de UNESKO favora al Esperanto

1954: UEA fariĝas NRO ĉe UN kaj UNESKO.

1960: Forta disvastiĝo en Afriko.

1985: Dua Rezolucio de UNESKO favora al Esperanto

1995: La apero de Interreto spronas la uzon de la lingvo.

2000 kaj poste: la lingvistoj laboras per observado de faktoj; konsekvence ili parolas objektivite pri Esperanto kaj lasas flanken la falsajn eldirojn.

2014 : La apero de la saĝaj telefonoj spronas la retan lernadon de la lingvo: Komence ĉe Duolingo per la angla: 2000 personoj komencas la studadon de Esperanto ĉiun tagon (en 2015)

3-Oficialaj agnoskoj rilataj al ESPERANTO

1923: Universala Poŝta Unio.

Ĝi decidas, ke Esperanto ne plu estos konsiderata kodo, sed klara lingvo ; do la pago ne plu estos por chiu litero, sed por chiu vorto.

1923: Ĉe la Ligo de Nacioj NITOBĖ Inazo verkas raporton pri la uzo de Esperanto kiel laborlingvo. La voĉdonado estas negativa.

1954: Rezolucio de UNESCO favora al Esperanto

1967: ISO elektas « eo » por Esperanto

1980: UNWTO, la Monda Organizo pri Turismo de UN rekomendas la lernadon kaj uzadon de Esperanto en sia “Deklaro de Manilo”.

1985: Rezolucio de UNESCO favora al Esperanto

1993: « PEN club international » akceptas la « Esperanto PEN klubon»

2003: Aperas www.eo.wikipedia.org

2006: Akreditigo ĉe la Eŭropa Lingva Referenckadro fare de Konsilio de Eŭropo

2006: La urbo Herzberg (DE) akiras oficiale la kromnomon “La Esperanto-Urbo”.

2008: Mozilla Firefox aperas en Esperanto.

2012 : Google lanĉas la aŭtomatan tradukadon el kaj al Esperanto (64^a lingvo)

2013: La Respubliko kaj Kantono Neuchâtel, Svislando, decidis inviti la trian Tutmondan Konferencon pri Instruado de Esperanto, kiu okazis en majo 2015.

2014: Unesko aperigas sur sia retejo la deklaron de Sinjorino Irina Bokova pri la Tago de la gepatra lingvo, 21an de februaro, en la 6 laborlingvoj de Unesko, en la bulgara (lingvo de S-ino Bokova) kaj Esperanto.

2014: Pollando metas Esperanton en sian liston de kulturaj nemateriaj heredaĵoj.

2017: UNESCO metas Zamenhof, la kreinton de Esperanto, (1859-1917) en la liston de 50 elstaraj personecoj honorigendaj dum la jaro.

© MIR jan 2017

4-ECOJ: Kia estas Esperanto?

a) EO estas logika.

Mal – signifas la kontraŭon :

Sana – **malsana**

Feliĉa - **malfeliĉa**.

Ĉiam.

b) La vortoj konstruiĝas kiel brikoj.

Ek = ideo de komenco :

Mi **ek**-manĝas.

Mi **ek**-kantas.

Ek al sukceso!

Ni **eku**!

Ekvilibro

Lernante kaj parolante Esperanton, la persono uzas samnivele, samintense la du hemisferojn de sia cerbo: la kreeman parton kaj la logikan parton. El tio fontas la **plezuro** ĉe la lernanto, ĉu infano, ĉu emerito.

(Laŭ Claude Piron, *psikologo kaj psikoanalisto*.)

Oni lernas per lern-modelo.

La kuracisto lernas per plasta korpo malmuntebla.

La kemiisto lernas per plastaj molekuloj malmunteblaj.

La aŭto-riparisto lernas per plasta motoro malmuntebla.

Tiuj modeloj havas tri ecojn: *ili estas simplaj, perfektaj, diserigeblaj*.

Esperanto estas tia modelo. Plie, ĝi estas funkcia lingvo.

Pro la ecoj de Esperanto kaj ĝia logika strukturo la lernanto havas tujan senton de **sukceso**. Tio donas motivadon.

Lernhelpa efiko de Esperanto

Se iu lernas unue Esperanton, tiu persono lernos pli facile kaj pli rapide aliajn fremdajn lingvojn.

(Laŭ eksperimentoj en Paderborn, Germanio)

Literaturo

Esperanto ofertas vastan literaturon originalan kaj tradukitan. Ĉiu etno en la mondo volas traduki siajn trezorojn al Esperanto, por doni ilin al la tuta mondo. La uzo de Esperanto ofertas aliron al la tuta mondo.

Kunvenoj

Okazadas ĉiun tagon kongresoj kaj renkontiĝoj. Per la Reto iu parolanto povas rilati kun aliaj personoj en la mondo. Per Esperanto oni riĉiĝas per homaj kontaktoj justaj.

© MIR jan 2017